Enhavo

Kovrildesegno: Quiado
- 3 - Bilanco pri la ĝenerala striko en Francaj Antiloj
- 6 - Retropaŝa restaĵo: alveno de municipaj abundfondusoj
- 8 - Kion ni manĝas?
- 13- Diferencemaj partikularismoj kaj universalistaj partikularismoj
- 17 - Proletoj ĉiulandaj, unuiĝu!
- 21 - La nomo
- 22 - Aŭskultado de Ermanno Tarracchini
- 28 - Determinismo – de mito al la arto kaj filozofio
- 34 - Kial mi ankoraŭ restas esperantisto
- 45 - Manci
- 46 - Pri hajko- kaj lingvo- beleco
- 47 - Tagiĝo en Haveno
- 48 - La ombro
- 48 - Adstring'
- 48 - Vjolo
- 48 - Foto : Adrián Caldera

Sennacieca Revuo
OFICIALA ORGANO DE S.A.T

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90. Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
Plenum-Komitato de SAT :
Prezidanto : Jakvo Ŝram
Ĝenerala Sekretario : Vinko Markovo
Kasistino : Thérèse Sabatier
Membroj: Guy Cavalier, Stefano Herve Gérard Lieblang, Franjo Leveque-Provost, Arturo Prent.

Kara leganto,
Denove SAT povas prezenti al vi "Sennacieca Revuo". La redaktoskipo de SAT kun plej granda zorgo kontrolis la revuon. Ne tute laŭ enhavo, ĉar la respondeco por tekstoj troviĝas ĉe la verkanto. Tamen ja, ĉar enhavo devas respondeci kun la statutaj ideoj de SAT.

La enhavo de ĉi tiu numero estas kiel kutime plej varia. Laŭ mi interesa. Estas teksto kiu plene akordiĝas kun la celoj de SAT, la laborista lukto. Teksto kiu lasas nin okulumi tion, kio vivas en pensoj de junaj homoj. Teksto pri nutraĵo, pri kiu okazis iom da diskuto en la redaktaskipo, sed kiel skribite, la autoro respondecas pri enhavo de lia teksto kaj la leganto povas libere reagi kaj kontraŭtezi.
Jorge Camacho denove kontribuis per du mallongaj poemoj.
Ĉiu gepatro scias pri problemoj kun infanoj, ĉu propraj aŭ amikoj de viaj idoj. Teksto kiu tretas vojon de filozofio ege kaptis mian atenton.
Kiel vi ĉiuj jam scias, mortis la grandulo de la japana esperanto-movado, Kurisu Kei. Pro tio ni prenis tekston de li, por ke vi povu legi kial li restis esperantisto.
Lastaj du paĝoj estas plene dediĉitaj al kulturo, al hajkoj kaj poemoj, fotografio kaj desegnaĵo.

Evidente mi esperas ke ankaŭ la aspekto de la revuo plaĉas al vi. Nu, kara mia leganto eble ni kaptas vian atenton per ĉi tiu numero. Sciu ke vi povas preni abonon al la revuo, same al Sennaciulo la dumonata revuo de SAT.

Plej plaĉas al mi ke vi faras paŝon aliĝi al SAT. Se vi kapablas paroli kaj kompreni esperanton. Kiam la sorto de homoj interesas vin, kiam vi pensas ke mondo sen militoj estas nepra klopodo, vi certe trovas vian vojon en SAT.

Estu bonvena.
Jakvo Schram
Prezidanto de Plenum-Komitato de SAT

Bilanco pri la ĝenerala striko en Francaj Antiloj

Dum vintro 2009 okazis la plej grava ĝenerala striko en la historio de francaj Antiloj. Post 44 tagoj da ĝenerala striko en Gvadelupo kaj 38 tagoj en Martiniko, la tieaj laboristoj sukcesis akiri interkonsenton pri diversaj urĝaj postuloj, el kiu la plej fama estis 200-eŭra plialtigo de la plej malaltaj salajroj. Iuj opinias, ke tiuj ĉi eventoj ne povas esti "eksportitaj" en metropola Francio. Aliaj male asertas, ke indus sekvi la ekzemplon de la antilaj laboristoj. Sed ambaŭ flankoj ĝenerale ne precize klarigas kio ne povus esti "eksportita" kaj kio indus tion. Kaj ĉefe, eĉ se plurfoje la metropolaj laboristoj esprimis sian solidarecon al la antilaj batalantoj, neniu ŝajne cerbumis kiamaniere pli intime ligi la estontajn batalojn de metropolaj kaj antilaj laboristoj.

La sociekonomia kadro: "ekstremranda" regiono de Eŭropa Unio, kiu funkcias kadre de planteja ekonomio

Gvadelupo kaj Martiniko, kiuj konsistigas francajn antilojn, formale liberiĝis de kolonia statuso post la dua mondmilito. Sed praktike, la loka ekonomio daŭre baziĝas sur eksportado (ĉefe bananoj kaj sukerkano), kaj la ekonomian povon tenas grupeto de familioj, kiuj estas idoj de sklavigantoj. Ilia monopola pozicio super la loka merkato ebligas al ili vendi varojn je prezoj 20% ĝis 40%-e pli altaj ol en metropolo, dum samtempe la salajroj estas inter 20% ĝis 50%-e pli malaltaj. Proksimume kvarono el la loĝantaro vivas sub la sojlo de malriĉeco. Tamen la ekzisto de ĉi tiuj foraj departementoj ne utilas nur al la loka kapitalistaro. Ilia ekzisto ebligas al la franca ŝtato posedi la trian plej ampleksan maran zonon en la mondo, kaj pagigi dogan- kaj trapas-rajtojn por la panama kanalo (danke al Antiloj) kaj por la sueza kanalo (danke al Reunio). Do, anstataŭ konsistigi « ŝarĝon », ĉiu tiuj departementoj estas inter la lastaj rimedoj de la franca imperiismo.

La politika kadro: socia movado ĉefe influata de klasbatala sindikatismo

La antila laborista movado travivis multajn batalojn, kiuj ofte estis sange subprematoj. La kolektivo Ligo Kontraŭ la Profitado (Lyannaj Kont Pwofitasyon), kiu organizis la batalon en Gvadelupo, konsistas el kvindeko da organizoj, interalie sindikatoj, sed ankaŭ asocioj. Tamen, klare montriĝas ke la spino de la kolektivo estas la potence organizita sindikato ĜUGL (Ĝenerala Unuiĝo de Gvadelupaj Laboristoj), kiu ricevis pli ol 50% el la voĉoj dum la lastaj profesiaj balotoj, do multe pli ol la Ĝenerala Labor-Konfederacio de Gvadelupo (ĜLKG, 23%). La ĜUGL estas sufiĉe nova, ĉar ĝi fondiĝis en 1973, surbaze de la deziro distanciĝi de la tradiciaj sindikataj organizoj, kiel montras la alvoko tiam redaktita de la fondokomitato:

"Dum la lastaj jaroj, laboristoj, kamparanoj, dungitoj el diversaj sektoroj kaj ŝtatfunkciuloj organizis amasmovadajn agadojn (strikojn, manifestaciojn, ktp...) kontraŭ la plifortigo de la ekspluatado de la kapitalisma klaso, de terposedanta klaso kaj de la ŝtato, kiu estas je ilia servo.

La kapitalisma klaso kaj la terposedanta klaso ĉiam uzis duoblan taktikon (unuflanke mensogoj, dividaj kaj koruptaj manovroj, kaj aliflanke armita subpremo) por rompi la justan batalon de la laboristoj. La laboristoj ja atingis kelkajn sukcesojn, sed ili ankaŭ spertis multajn fiaskojn.

Kial do?

La laboristoj, la kamparanoj kaj la ceteraj salajruloj ne havis sufiĉan klaskonscion; ili ankoraŭ ne sciis klare kompreni kiuj estas iliaj amikoj, kaj kiuj estas iliaj malamikoj; ili ne estis sufiĉe unuecaj kaj organizitaj. Tamen, la ĉefa kaŭzo de ĉi tiuj malvenkoj estas, ke la laboristoj estis perfiditaj de la sindikataj gvidantoj. La gvidantoj de ĉi tiuj sindikatoj kunlaboras kun la kapitalistoj, la terposedantoj kaj la kapitalisma ŝtato kontraŭ la laboristoj.

Sed nek la mensogoj, nek la manovroj por divido kaj koruptado, nek la armita subpremo de la kapitalisma klaso kaj de la terposedantoj, nek la perfido de la ĉefaj sindikatoj malebligis la disvolviĝon kaj pliakriĝon de la klasbatalo. La klasoj ekzistas kaj la klasbatalo estas neevitebla.

[...]

Bilancante pri siaj batalspertoj, la malriĉaj kamparanoj unue forĵetis la gvidantaron de la klaskunlaboraj sindikatoj; ili unuiĝis, organiziĝis kaj kreis du klasbatalajn sindikatajn organizojn: UKL (Unuiĝo de Kamparaj Laboristoj) kaj UMGK (Unuiĝo de Malriĉaj Gvadelupaj Kamparanoj).

Dum la tri postaj jaroj, ambaŭ organizoj kunordigis du potencajn amasmovadojn kiuj montris al laboristoj de ĉiuj sektoroj, ke la regantoj de ĉiuj sindikataj centraloj estas perfiduloj.

Multaj laboristoj, ĉiusektoraj salajruloj, kaj malaltrangaj funkciuloj aprobis la sindikatan orientiĝon de UKL. Ili decidis unuiĝi ĉirkaŭ ĝi por organizi veran klasbatalan centralon."

Tridekkvin jarojn poste, kaj malgraŭ ĉi tiu radikala linio rilate al tradiciaj organizoj, la ĜUGL sukcesis iĝi la ĉefa sindikato. El ekstere estas malfacile taksi la amplekson de ĝia socia enradikiĝo. Sed la legado de ĝia retejo disponigas almenaŭ specimenan bildon: ĝi enhavas samtempe praktikajn informojn, interalie pri la laborjuro kaj pri la aktiveco de la diversaj sindikataj sekcioj, sed ankaŭ historiajn analizojn pri la ĉefaj okazaĵoj rilate al klasbatalo en Gvadelupo. Kaj fakte, dum la striko, multaj el la komunikoj kaj raportoj de la LKP aperis rekte sur la retejo de ĜUGL, eĉ antaŭ publikigo sur la retejo de la LKP.

La komparo kun Martiniko ebligas taksi la gravecon de ĉi tiu « subjektiva faktoro », kiu estas la ekzisto de bone organizita sindikato: en Martiniko, kie ne ekzistas ekvivalento de ĜUGL, la movado ekis pli malfrue (la 5an de februaro), kaj la kvanto de rete disponigitaj informoj estis multe malpli abunda, dum la strataj perturboj, responde al policistaj provokoj, estis pli grandaj.

Malgraŭ ĝia radikalismo, ĜUGL, male al la metropolaj "maldekstristaj" organizoj, sukcesis kunlabori kun aliaj sindikatoj kaj asocioj por konstrui la movadon, metante sian organizan potencon je la servo de la tuta laboristaro.

Tipa ekzemplo pri duobla povo

Pluraj atestantoj substrekis, ke neniu malsatmortis dum la ĝenerala striko. Ja, la strikokomitatoj organizis la nutraĵprovizadon, decidante pri la prezoj de la aĉeteblaj manĝaĵoj, organizante la rubaĵkolektadon kaj zorgante pri la provizado de la benzinejo, kie prioritatis la flegistaj kaj hejmvartaj veturiloj. Kelkaj komunikoj de la Kolektivo de la 5a de februaro (Martinika ekvivalento de la LKP), similis, iagrade, registarajn dekretojn:

Nutraĵprovizado

- la kolektivo de la 5a de februaro 2009 firme denuncas la troigajn prezojn de iuj komercistoj kaj terkulturistoj dum ni batalas kontraŭ la tro altaj vivokostoj kaj por la aĉetpovo.

- la kolektivo de la 5a de februaro 2009 informas, ke estos prenitaj decidoj por ĉi tiu semajnofino, por ke la loĝantaro havu la eblecon provizi sin en apudhejmaj butikoj.

Hejmaj rubaĵoj

- la kolektivo de la 5a de februaro 2009 informas ke ekde hodiaŭ la kolekto de hejmaj rubaĵoj estas organizita en la ĉefurbo por eviti la multobliĝon de malutilaj bestoj kaj eviti ĉiun sanan riskon.

(Gazetara komuniko de la 13/02/2009 07:00)

Provizado per benzino

Inciatite de Christian Ursulet, el la sanservo, kaj de s-ino Conconne, helpantino de la Deputito kaj Urbestro de Fort de France, okazis kunveno pri la benzinomanko kaj ĝiaj eblaj sanaj sekvoj. La prezidanto de la administra konsilantaro de la Universitata Hospital-Centro, ĝia direktoro, kuracista delegito de la kolektivo CDMT, CGTM-FSM, FO de la SARA-dungitoj, la CGTM-reprezentantoj de la hidrokarbidaj transportistoj, la delegitoj el FO, CGTM, CDMT de la hospitalaj laboristoj, mastrumantoj de benzinvendejoj, delegito de la naftovendistoj, aktivulo de la CGTM pri ĉi tiu sektoro kaj ano de la kolektivo de la 5a de februaro ĉeestis.

Konklude:

Ni decidis provizi kiel eble plej multajn benzinvendejojn laŭeble plej homogene sur la tuta teritorio. Aparta klopodo estis petita al la strikantaj salajruloj por sabato. Komence de posttagmezo sabate, benzino estos denove abunde havebla en Martiniko, kaj same lunde.

Aldone al la sanaj riskoj, estas klare, ke la problemo pri benzino povas limigi la partoprenon en la